

11 POETO

Ĝi estis ordinara polica kazo: je la kvara matene surveturis aŭto en Žitná strato ebriani maljunulinon kaj kun maksimuma rapido forveturis. Kaj nun la juna polica praktikanto doktoro Mejzlik estis esploranta, kiu aŭto ĝi estis. Tia juna praktikanto tion prenas serioze. "Hm," diris doktoro Mejzlik al policisto numero 141, "vi do vidis el distanco de tricent paŝoj rapide veturantan aŭton kaj sur la tero homan korpon. Kion vi faris unue?"

"Unue mi kuris al la vunditino," raportis la policisto, "por doni al ŝi la unuan helpon." "Unue vi estus identigonta la veturilon," murmuris doktoro Mejzlik, "kaj nur poste zorgi pri la maljunulinaĉo. Sed eble," li aldiris, gratante sin per kraĵono en la hararo, "ke ankaŭ mi farus same. Do numeron de la veturilo vi ne vidis; kaj kio alie koncernas tiun veturilon -?" "Mi opinias," diris hezite la policisto numero 141, "ke ĝi estis malhela. Eble ĝi estis blua aŭ ruĝa. Tio ne estis bone videbla pro la fumo el gastubo." "Aĥ, Jesuo Kristo," lamentis doktoro Mejzlik, "kiel mi konstatu, kiu veturilo ĝi estis? Ĉu kuri al ĉiuj ŝoforoj kaj demandi ilin: Mi petas ĝentile, ĉu vi ne surveturis oldan maljunulinaĉon? Nu, homo, kion mi faru kun tio?"

La policisto ŝultrolevis en subalterna senkonsilo. "Mi petas," li diris, "al mi anonciĝis iu atestanto, sed ankaŭ li scias nenion. Mi petas, li atendas apude." "Do alkonduku lin," diris doktoro Mejzlik tedite kaj vane klopodante ellegi ion el la magra protokolo. "Mi petas nomon kaj domicilon," li diris mekanike; la atestanton li eĉ ne rigardis.

"Kralík Jan, studento de inĝenierfako pri maŝinoj," eldiris firme la atestanto. "Do sinjoro, vi ĉeestis, kiam hodiaŭ matene je la kvara surveturis nekonata aŭto Božena-n Macháčková."

11 BÁSNÍK

Byla to běžná policejní událost: ve čtyři hodiny ráno přejelo auto v Žitné ulici opilou stařenu a v největší rychlosti ujelo. A teď měl mladý policejní koncipient dr. Mejzlik vyšetřit, které auto to bylo. Takový mladý koncipient to bere vážně. "Hm," řekl dr. Mejzlik strážníkovi číslo 141, "tak vy jste viděl ze vzdálenosti tři set kroků rychle jedoucí auto a na zemi lidské tělo. Co jste nejdřív udělal?"

"Nejdřív jsem běžel k té přejeté," hlásil strážník, "abych jí poskytl první pomoc." "Nejdřív jste měl zjistit ten vůz," bručel dr. Mejzlik, "a teprve pak se starat o bábu. Ale možná," dodával, drbaje se tužkou ve vlasech, "že bych já to udělal zrovna tak. Tedy číslo vozu jste neviděl; a co se jinak toho vozu týče -?" "Myslím," řekl váhavě strážník číslo 141, "že byl nějaký tmavý. Možná, že byl modrý nebo červený. To nebylo dobře vidět pro kouř z výfuku." "Ach ježíšikriste," naříkal dr. Mejzlik, "jakpak mám potom zjistit, který to byl vůz? Copak mám běhat po všech šoférech a ptát se jich: Pěkně prosím, nepřejeli jste starou bábu? No tak, člověče, co s tím mám dělat?"

Strážník pokrčil rameny v subordinované bezradnosti. "Prosím," řekl, "mně se přihlásil jeden svědek, ale neví taky nic. Prosím, on čeká vedle." "Tak ho přiveďte," řekl dr. Mejzlik znechuceně a marně hleděl něco vykukat z hubeného protokolu. "Prosím, jméno a bydliště," řekl mechanicky; ani se na svědka nepodíval. "Kralík Jan, studující strojího inženýrství," pronesl svědek pevně. "Tak vy jste, pane, byl při tom, když dnes ráno ve čtyři hodiny přejelo neznámé auto Boženu Macháčkovou."

"Jes, kaj mi devas diri, ke la ŝoforo estas kulpa. Mi petas, sinjoro komisaro, la strato estis tute vaka; se la ŝoforo malakcelus sur vojkruciĝo - "

"Kiel proksime vi staris?" interrompis lin doktoro Mejzlík. "Ĉirkaŭ dek paŝojn. Mi akompanis mian amikon el - el kafejo, kaj kiam ni estis en strato Žitná -"

"Kiu estas via amiko?" interrompis lin denove doktoro Mejzlík. "Tiun mi ne havas ĉi tie." "Jaroslav Nerad, poeto," diris la atestanto kun ioma fiero. "Sed tiu versimile dirus nenion al vi."

"Kial ne?" murmuris doktoro Mejzlík, kaptante ĉian spureron. "Ĉar li... estas tia poeto. Kiam okazis la mafeliĉo, li ekploris kaj kuris hejmen kiel eta infano. Kiam do ni estis en strato Žitná, veturegis de malantaŭe aŭto per freneza rapido - "

"Kiun numeron ĝi havis?" "Tion mi ne scias, mi petas. Tion mi tute ne rimarkis. Mi rimarkis nur la frenezan veturon kaj ĵus mi diris al mi, ke - "

"Kaj kia veturilo ĝi estis?" interrompis lin doktoro Mejzlík. "Kvartakta eksplodmotoro," diris eksperte la atestanto. "En aŭtomarkoj kompreneble mi ne estas sperta."

"Kaj kiun koloron ĝi havis? Kiu sidis en ĝi? Ĉu ĝi estis kabrioleta aŭ limuzino?" "Tion mi ne scias, diris la atestanto embarasite. "Mi opinias, ke ĝi estis ia nigra veturilo; sed pli detale mi tion ne rimarkis, ĉar kiam okazis la malfeliĉo, mi diris al Nerad: Vidu, tiuj latronoj surveturas homon kaj eĉ ne haltas!"

"Hm," opiniis doktoro Mejzlík malkontente, "tio ja estas tute konvena kaj ĝusta morala reago, sed mi ŝatus pli, se vi rimarkus numeron de la veturilo. Estas mirige, sinjoro, kiel la homoj ne scias observi. Vi scias ja, ke la ŝoforo kulpas, vi juĝas kompreneble ĝuste, ke tiuj homoj estas latronoj, sed la numeron vi ne rigardas. Juĝi scias ĉiu: sed funde, objektivite rimarki la aferojn - Mi dankas al vi, sinjoro Králík; mi ne detenos vin."

"Ano, a ja musím říci, že šofér je vinen. Prosím, pane komisaři, ulice byla úplně volná; kdyby byl šofér na křižovatce zpomalil - "

"Jak jste stál daleko?" přerušil ho dr. Mejzlík. "Na deset kroků. Já jsem doprovázel svého přítele z - z kavárny, a když jsme byli v Žitné ulici -"

"Kdo je váš přítel?" přerušil ho znovu dr. Mejzlík. "Toho tady nemám." "Jaroslav Nerad, básník," řekl svědek s jistou hrdostí. "Ale ten by vám asi nic neřekl."

"Proč ne?" bručel dr. Mejzlík, chytající se stébla. "Protože on... je takový básník. Když se stalo to neštěstí, dal se do pláče a utíkal domů jako malé dítě. Tedy když jsme byli v Žitné ulici, přihnalo se odzadu šílenou rychlostí auto -"

"Jaké mělo číslo?" "To nevím, prosím. Toho jsem si nevšiml. Já jsem pozoroval tu šílenou jízdu, a zrovna jsem si řekl, že -"

"A jaký to byl vůz?" přerušil ho dr. Mejzlík. "Čtyřtakový výbušný motor," pravil znalecky svědek. "Ve značkách aut já se ovšem nevyznám."

"A jakou měl barvu? Kdo v něm seděl? Byl otevřený, nebo zavřený?" "To nevím," děl svědek zaražen. "Myslím, že to byl nějaký černý vůz; ale blíž jsem si toho nevšiml, protože když se stalo to neštěstí, řekl jsem Neradovi: Koukej, ti lotři přejedou člověka a ani se nezastaví!"

"Hm," mínil dr. Mejzlík nespokojeně, "to je sice docela místná a správná morální reakce, ale já bych byl raději, kdybyste si všiml čísla vozu. To je úžasné, pane, jak lidé nedovedou pozorovat. Vy ovšem víte, že šofér je vinen, vy ovšem správně soudíte, že ti lidé jsou lotři, ale na číslo se nekouknete. Soudit dovede každý; ale pořádně, věcně si všimnout věci - Děkuju vám, pane Králíku; nebudu vás zdržovat."

Post unu horo sonorigis la policisto numero 141 ĉe la loĝejmastrino de poeto Jaroslav Nerad. Jes, sinjoro, la poeto estas hejme, sed dormas. La poeto okulegis el la pordo per etaj miregantaj okuletoj je la policisto; iel li ne povis rememori, kion fakte li faris. Fine tamen li ekkomprenis, kial li iru en policejon.

"Ĉu ĝi devas esti?" li demandis malkonfide. "Nome jam nenion plu mi memoras; mi estis nokte iom -" "Drinkinta," diris la policisto kompreneme. "Sinjoro, mi ekkonis multajn poetojn. Do, sinjoro, vestiĝu; ĉu mi atendu vin?"

Poste la poeto kaj la policisto komencis paroli pri noktaj lokaloj, pri la vivo entute, pri strangaj fenomenoj sur la ĉielo kaj multaj aliaj temoj; nur la politiko estis al ambaŭ fremda. Tiel en amika kaj instrua interparolo venis la poeto al la policejo.

"Vi estas sinjoro Nerad Jaroslav, poeto," diris al li doktoro Mejzlík. "Sinjoro atestanto, vi ĉeestis, kiam la nekonata aŭto surveturis tiun Božena Macháčková." "Jes," elspiris la poeto.

"Ĉu vi povus diri al mi, kia aŭto ĝi estis? Ĉu kabrioletu aŭ limuzino, de kia koloro, kiu sidis en ĝi, kiun numeron ĝi havis?" La poeto intense pripensis. "Tion mi ne scias," li diris, "tion mi ne rimarkis."

"Ĉu vi rememoras iun detalon?" insistis Mejzlík. "Eĉ ne ete," diris la poeto sincere. "Sciu, entute neniam mi atentis la detalojn."

"Mi petas vin," komencis doktoro Mejzlík ironie, "kion do entute vi rimarkis?" "La tutan etoson," diris la poeto neprecize. "Sciu, la forlasitan straton... tian longan... dum krepusko... kaj kiel tiu ino restis tie kuŝanta -" Subite li eksaltis. "Ja ion mi pri ĝi skribis, veninte hejmen!" Li palpis en ĉiuj poŝoj kaj eltiris aron de kovertoj, fakturoj kaj de aliaj tiaj paperaĉoj. "Ne, ĉi tio ĝi ne estas," li grumblis, "ĉi tio ankaŭ ne - Ni atendu, eble tio ĝi estas," li opiniis absorbite observante dorsflankon de iu koverto.

"Montru tion al mi," diris doktoro Mejzlík indulgeme. "Ĝi estas nenio," defendis sin la poeto. "Sed se vi volas, mi tralegos tion al vi."

Za horinu zazvonil strážník číslo 141 u bytné básníka Jaroslava Nerada. Ano, pan básník je doma, ale spí. Básník vykukil ze dveří malá užaslá očka na strážníka; nemohl se jaksi upamatovat, co vlastně provedl. Nakonec přece jenom pochopil, proč má jít na policii.

"Musí to být?" ptal se nedůvěřivě. "Já se totiž na nic už nepamatuju; já byl v noci trochu -" "Nalitej," děl strážník chápavě. "Pane, já jsem poznal mnoho básníků. Tak se, pane, ustrojte; mám na vás počkat?" Načež se básník a strážník dostali do řeči o nočních lokálech, o životě vůbec, o zvláštních úkazech na nebi a mnohých jiných předmětech; jen politika byla oběma cizí. Takto v přátelském a poučném hovoru se dostal básník na policii.

"Vy jste pan Nerad Jaroslav, básník," řekl mu dr. Mejzlík. "Pane svědku, vy jste byl při tom, když neznámé auto přešlo Boženu Macháčkovou." "Ano," vydechl básník.

"Mohli byste mně říci, jaké to bylo auto? Zda bylo otevřené nebo zavřené, jaké barvy, kdo v něm seděl, jaké mělo číslo?" Básník usilovně přemýšlel. "To nevím," řekl, "já jsem si toho nevšiml."

"Nevzpomínáte si na žádnou podrobnost?" naléhal Mejzlík. "Kdepak," děl básník upřímně. "Víte, já nedávám vůbec na podrobnosti pozor."

"Tak prosím vás," spustil dr. Mejzlík ironicky, "co jste tedy vůbec pozoroval?" "Tu celou náladu," pravil básník neurčitě. "Víte, tu opuštěnou ulici... takovou dlouhou... za úsvitu... a jak tam ta ženská zůstala ležet -" Najednou vyskočil. "Vždyť já jsem o tom něco napsal, když jsem přišel domů!" Hrabal se ve všech kapsách a vytahal množství obálek, účtů a jiných takových hadrů. "Ne, tohle to není," brumlal, "tohle taky ne - Počkejme, snad je to tohle," mýnil pohřížen v pozorování rubu jakési obálky.

"Ukažte mi to," řekl dr. Mejzlík shovívavě. "To nic není," bránil se básník. "Ale jestli chcete, já vám to přečtu."

Post kio entuziasme okulegante kaj kanteme plilongigante longajn silabojn, li recitis:

"Marŝ' de l' sombraj domoj un' du haltu ek
ruĝ' matena mandolinas
kial vi knabin' vangruĝas
aŭtos ni sage per 120 ĈP al mondfino
aŭ al Singapuro eble
haltu, haltu, aŭto flugas
nia granda amo polve kuŝas
knabin' rompita flor'
cigna kolo, brust' tamburo kaj cimbaloj
kial tiom mi ploras

Jen ĉio," deklaris Jaroslav Nerad. "Mi petas vin," diris doktoro Mejzlík, "kion ĝi signifas?" "Nu ja... tio estas la malfeliĉo kun la aŭto, ekmiris la poeto. "Ĉu ĝi ne estas komprenebla?"

"Mi pensas, ke ne," opiniis doktoro Mejzlík kritike. "Iel mi ne povas ekkoni el tio, ke la 15-an de julio je la kvara matene en Žitná strato surveturis aŭto numero tiu kaj tiu sesdekkvinjaran ebrian almozulon Božena Macháčková; la vunditino estis fortransportita en la ĝeneralan hospitalon, kie ŝi agonias. Ĉi tiujn faktojn via poemo, sinjoro, laŭ tio, kiom mi rimarkis, ne mencias. Tiel."

"Tio estas nur la kruda realo, sinjoro," diris la poeto frotante sian nazon. "Sed poemo estas interna fakto. Poemo, tio estas liberaj superrealaj imagoj, kiujn la faktoj elvokas en subkonscio de poeto, ĉu? La vid- kaj aŭdo-asociadoj... Kaj al tiuj devas leganto submetiĝi," deklaris Jaroslav Nerad mentore. "Poste oni tion komprenas."

"Mi petas vin," impetis doktoro Mejzlík. "Aŭ atendu, pruntedonu al mi tiun vian opuson. Dankon. Do jen ni havas, hm:

Naĉež vykuliv nadšeně oči a zpěvavě protahuje dlouhé slabiky recitoval:

"Marš tmavých domů ráz dva zastavit stát
úsvit na mandolínu hrá
proč dívka proč se červenáš
pojedu vozem 120 HP na konec světa
nebo do Singapore
zastavte zastavte vůz letí
naše veliká láska v prachu leží
dívka zlomený květ
labutí šije řadra buben a činely
proč tolik pláču

A to je celé," prohlásil Jaroslav Nerad. "Prosím vás," řekl dr. Mejzlík, "co to má znamenat?" "No přece, to je to neštěstí s tím autem," podivil se básník. "Copak tomu není rozumět?"

"Myslím, že ne," mínil dr. Mejzlík kriticky. "Já v tom jaksi nemohu poznat, že dne 15. července ve čtyři hodiny ráno v Žitné ulici přejelo auto číslo to a to pětadesátiletou opilou žebračku Boženu Macháčkovou; raněná byla odvezena do Všeobecné nemocnice a zápasí se smrtí. O těchto faktech se vaše báseň, pane, pokud jsem pozoroval, nezmiňuje. Tak."

"To je jen syrová skutečnost, pane," děl básník mna si nos. "Ale báseň je vnitřní skutečnost. Báseň, to jsou volné, surreální představy, které skutečnost vyvolá v podvědomí básníka, víte? Takové ty zrakové a sluchové asociace. A těm se má čtenář poddat," prohlásil Jaroslav Nerad káravě. "Pak tomu rozumí."

"Prosím vás," vybuchl dr. Mejzlík. "Nebo počkejte, půjčte mi ten váš opus. Děkuju. Tak tu máme, hm:

Marŝ' de l' sombraj domoj, unu, du, haltu, ek. Mi petas do, klarigu al mi -" "Ja ĝi estas Žitná strato," diris la poeto trankvile. "Tiaj du domovicoj, jes?"

"Kaj kial ĝi ne estas eventuale Nacia avenuo?" demandis doktoro Mejzlik skeptike. "Ĉar tiu ne estas tiel rekta," sonis konvinka respondo. "Do plue. Ruĝ' matena mandolinas - Nu, povas esti. Kial vi knabin' vangruĝas - Mi petas vin, de kie aperas la knabino?" "Matenruĝo," diris la poeto lakone.

"Ha, pardonu. Aŭtos ni sage per 120 ĈP al mond'fino. Nu?" "Versimile alveturis la aŭto," eksplikis la poeto.

"Kaj ĉu ĝi havis 120 ĈP?" "Tion mi ne scias; tio signifas, ke ĝi veturis rapide. Kvazaŭ ĝi volus flugi ĝis fino de la mondo."

"Ah, tiel; Aŭ al Singapuro - Miadio, mi petas vin, kial ĝuste al Singapuro?" La poeto ŝultrolevis. "Jam mi ne scias. Eble tial, ĉar tie estas malajoj."

"Kaj kian rilaton havas la aŭto al malajoj? He?" La poeto deprimite tremetis. "Eble la veturilo estis bruna, ĉu vi ne opinias?" li diris meditante. "Io bruna tie certe estis. Kial alie estus tie Singapuro?"

"Do vidu," diris doktoro Mejzlik, "tiu veturilo estis ruĝa, blua kaj bruna. Kion mi elektu el tio?" "Elektu la brunan," konsilis la poeto. "Ĝi estas agrabla koloro."

"Nia granda amo polve kuŝas, knabin' rompita flor'" legis doktoro Mejzlik. "Tiu rompita flor', tio estas la ebria almozulino?" "Mi ne skribos ja pri ebria almozulino," diris la poet tuŝite. "Simple ŝi estis virino, ĉu vi komprenas?"

"Ha. Kaj kio estas ĉi tio: Cigna kolo, brust' tambur kaj cimbaloj. Tio estas libera asociado?" "Montru," diris la poeto embarasite kaj kliniĝis super la papero. "Cigna kolo, brust' tamburo kaj cimbaloj - kio ĝi povas esti?" "Ĝuste je tio mi demandas," murmuris doktoro Mejzlik iom ofende.

Marŝ tmavých domů ráz dva zastavit stát.‘ Tedy mně, prosím, vyložte –” “To je přece Žitná ulice,” pravil básník klidně. “Takové dvě řady domů, víte?”

“A proč to není třeba Národní třída?” ptal se dr. Mejzlík skepticky. “Protože ta není tak rovná,” zněla přesvědčující odpověď.

“Tak dál. ‚Úsvit na mandolínu hrá‘ - No, dejme tomu. ‚Proč dívka proč se červenáš‘ – Prosím vás, kde se tu bere ta dívka?” “Červánky,” řekl básník lakonicky.

“Aha, promiňte. ‚Pojedem vozem 120 HP na konec světa‘ –Nu?” “To asi přijel ten vůz,” vysvětloval básník.

“A měl 120 HP?” “To já nevím; to znamená, že jel rychle. Jako by chtěl letět až na konec světa.”

“Ah tak. ‚Nebo do Singapore‘ – Proboha vás prosím, proč zrovna do Singapore?” Básník pokrčil rameny. “To už nevím. Třeba proto, že tam jsou Malajci.”

“A jaký má vztah to auto k Malajcům? He?” Básník sebou stísněně vrtěl. “Možná, že ten vůz byl hnědý, nemyslíte?” řekl zahloubaně. “Něco hnědého tam jistě bylo. Proč by tam jinak byl Singapore?”

“Tak vidíte,” řekl dr. Mejzlík, “ten vůz už byl červený, modrý a černý. Co si z toho mám vybrat?” “Vyberte si hnědý,” radil básník. “To je příjemná barva.”

“Naše veliká láska v prachu leží dívka zlomený květ,” četl dál dr. Mejzlík. “Ten zlomený květ, to je ta opilá žebračka?” “Přece nebudu psát o opilé žebračce,” pravil básník dotčen. “Byla to prostě žena, rozumíte?”

“Aha. A co je tohle: ‚labutí šije ňadra buben a činely.‘ To jsou volné asociace?” “Ukažte,” řekl básník zaražen a naklonil se nad papír. “‚Labutí šije ňadra buben a činely‘ – co to má být?” “Na to se právě ptám,” bručel dr. Mejzlík poněkud urážlivě.

"Atendu," meditis la poeto; "io tie devis esti, kio rememorigis min - Aŭdu, ĉu iam ne impresas vin duo kiel cigna kolo? Rigardu," kaj skribis krajone 2. "Ha," diris doktoro Mejzlík atente. "Kaj kio la brust'?" "Tio ja estas 3, du arketoj, ĉu?" miris la poeto. "Ankoraŭ vi havas tie tamburon kaj cimbalojn," impetis la policoficisto streĉe. "Tamburo kaj cimbaloj," meditis poeto Nerad, "tamburo kaj cimbaloj... tio povus esti eble la kvino, ĉu? Rigardu," li diris kaj skribis numeron 5. "Tiu ventreto estas kiel tamburo kaj supre cimbaloj -"

"Atendu," diris doktoro Mejzlík kaj skribis sur papereto 235. "Ĉu vi estas certa pri tio, ke la aŭto havis numeron 235?" "Nepre neniun numeron mi rimarkis," deklaris Jaroslav Nerad decide. "Sed io tia devis tie esti - de kie ĝi povus aperi?" li miris, cerbumante super la poemeto. "Sed sciu, ĉi-loko estas la plej bona el la tuta poemo."

Post du tagoj vizitis doktoro Mejzlík la poeton; la poeto ĉi-foje ne dormis; sed havis tie iun knabinon kaj vane serĉis vakan seĝon, por ĝin prezenti al la polic-oficisto.

"Tuj mi kuras plu," diris doktoro Mejzlík. "Nur mi venas diri al vi, ke vere ĝi estis veturilo numero 235." "Kiu veturilo?" miregis la poeto. "Cigna kolo, brust' tamburo kaj cimbaloj," elŝutis per unu spiro doktoro Mejzlík. "Kaj Singapuro ankaŭ."

"Ha, jam mi scias," diris la poeto. "Vi vidas do, jen la interna fakto. Ĉu vi volas, ke mi tralegu al vi kelkajn plurajn poemojn? Nun vi komprenos ilin."

"Nur alifoj," rapidis diri la polic-oficisto. "Kiam denove mi havos iun kazon."

"Poĉkejte," pemyŝlel básnik, "něco tam muselo být, co mně připomnělo – Poslouchejte, nepřipadá vám někdy dvojka jako labutí šíje? Koukejte se," a napsal tužkou 2. "Aha," řekl dr. Mejzlík pozorně. "A co ta ňadra?" "To je přece 3, dva obloučky, ne?" divil se básník. "Ještě tam máte buben a činely," vyhrkl policejní úředník napjatě. "Buben a činely," pemyŝlel básník Nerad, "buben a činely... to by snad mohla být pětka, ne? Helejte," řekl a napsal číslici 5. "To bříško je jako buben, a nahoře činely –"

Poĉkejte," řekl dr. Mejzlík a napsal si na papírek 235. "Jste si tím jist, že to auto mělo číslo 235?" "Já jsem si vůbec žádného čísla nevšiml," prohlásil Jaroslav Nerad rozhodně. "Ale něco takového tam muselo být – kdepak by se to tu vzalo?" divil se, hloubaje nad básničkou. "Ale víte, to místo je to nejlepší z celé básně."

Za dva dny navštívil dr. Mejzlík básníka; básník tentokrát nespál, nýbrž měl tam nějakou dívku a marně sháněl prázdnou židli, aby ji policejnímu úředníkovi nabídl.

"Já už zase běžím," řekl dr. Mejzlík. "Já vám jen jdu říci, že to byl opravdu vůz číslo 235." "Jaký vůz?" užasl básník. "Labutí šíje ňadra buben a činely," vysypal jedním dechem dr. Mejzlík. "A Singapore taky."

"Aha, už vím," děl poeta. "Tak vidíte, to máte tu vnitřní skutečnost. Chcete, abych vám přečetl pár jiných básní? Teď už jim budete rozumět."

"Až jindy," řekl honem policejní úředník. "Až zase budu mít nějaký případ."